

## El la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA)

### Vizito en BerO

Antaŭ la estrarkunsido Rudolf Fischer vizitis la Esperanto-domon en Berlin. Amike akceptis lin kaj lian edzinon Johann Pachter, Henryk Wenzel kaj Irina Gerasimova. Kune kun Inge Lawin oni serĉis kaj mendis meblojn, kiuj intertempe estas instalitaj. Poste, de la 18a ĝis la 20a de marto, la GEA-estraro kunvenis en Michelstadt.

### GEA aktivas tro, diras la impost-oficejo

Ĉar GEA organizas plurajn bone vizitatajn aranĝojn, ekiĝas nun la demando, ĉu GEA ne devos pagi impostojn? Problemon kaŭzas precipe ampleksaj enspezoj por tranoktado kaj manĝoj, kvankam el tiuj normalkaze ne rezultas granda gajno. Ĉar la trijara raporto devos esti liverata al la impost-oficejo ĝis fino de majo, la GEA-estraro decidis konsulti specialiston. Ankaŭ abonojn kaj anoncojn de *Esperanto aktuell*, vendadon de lernolibroj, eĉ la distribuadon de varbiloj kaj materialoj la impost-oficejo rigardas komercado.

Henryk Wenzel, la oficejestro, kaj helpantino Inge Lawin planas, kie staru la novaj mebloj.



Eble GEA devos fondi por ĉiu aranĝo apartan societon por resti sub la tolerataj limoj.

### La gvidliniojn de Sonnenberg

pri Eŭropa lingvopolitiko Felix Zesch intencas kompili al aparta broŝuro, kiu aperu en la serio de Germana Esperanto-Instituto. Sed antaŭe la membrokunveno devos akcepti la enhavon (vidu *Esperanto aktuell* 2010/6, p. 6f).

### EU-projekto

GEA kunkandidatas por EU-projekto, el kiu povus flui rimarkebla mono. La centran organizadon faras la Italaj Esperantistoj Francesco Maurelli kaj Bruĉjo Cassini, kiuj por tio fondis firmaon. Partoprenas krom GEA la landaj asocioj de Italujo, Flandrujo, Francujo, Svisujo, Polujo, Hispanujo kaj Bulgarujo. La GEA-respondeculo estas estrarano Wolfgang Bohr.

### Retpaĝaro kun Drupal

Felix Zesch kaj Sebastian Kirf planas, kune kun Clemens Fries de



Germana Esperanto-Junularo (GEJ) krei novan komunan koncepton por la retpaĝaro de GEA kaj GEJ. Oni decidis uzi la konatan Enhav-Manipulan Sistemon (CMS) Drupal.

### Esperanto en la universitatojn

Estrarano Christof Krick kolektas la adresojn de Esperantistoj en Germanujo, kiuj kapablas kaj pretas gvidi Esperanto-kursojn en universitato. Kiam troviĝos tia taŭgulo, la GEA-estraro kontrolos, ĉu ekzistas universitato en ties proksimejo, kaj provos proponi kurson. Sen instruisto tio ne havus sencon. Kunlaboremuloj bv. turni sin al [christof.krick@esperanto.de](mailto:christof.krick@esperanto.de).

### Jubilea jaro 2012

La estraro salutis la pretecon de Ursula Niesert fondi laborgrupon por la jubilea jaro 2012. En Michelstadt unu ideo jam ekiĝis, sed antaŭ ol raporti pri ĝi, necesos ankoraŭ kelkaj esploroj.

### Ŝildo de Zamenhof-parko ŝtelita

Ĉirkaŭ la 10an de marto nekonataj buboj ŝtelis la ŝildon de la Zamenhof-parko, kiu situas najbare al la Esperanto-domo en Berlin. Peter Kühnel zorgas pri nova ekzemplero. La GEA-estraro decidis pagi la novan ŝildon, kiu ĉi-foje tiom fikse estu muntata, ke estontaj ŝtelistoj devos uzi bruatan metaltranĉmaŝinon por reŝteli ĝin.

Rudolf Fischer